7. Jan. 1931
M 1 C. Gottgetreu, Herrenstr. 12

7-a JARO, N-o 327 LEIPZIG, 8. / 1. 1931

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerhner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE

HISPANIO – ĜIA EVOLUO DE 1923 ĜIS HODIAŬ

De K-do el Hispanio, kies nomon ni ĉi tie ne publikigas laŭ lia propra deziro (li jam estis arestita pro sia politika aktiveco), ni ricevis la sekvantan priskribon, kiu iom konatigas nin kun proletaro k laborista movado en tiu lando. La lastsemajnaj okazoj ree direktis la streĉan atenton de l' tutmonda laboristaro al la proletaro hispania, pri kies efektiva forto k pozicio ni ĝenerale tro malmulte estas informitaj per la nacilingva laborista gazetaro. Red.

Kompreneble, kiel en la ceteraj partoj de l' mondo, ankaŭ en Hispanio la tempo evoluigas la vivostaton en ĉiuj ĝiaj aspektoj. Precipe tio montriĝas rilate la politikajn movadojn. Sed, rigardante la okazintaĵojn en Hispanio, ni facile konstatas, ke tie la proletpolitikaj aferoj postsekvas la evoluon en aliaj landoj.

En Hispanio troviĝas du grandaj proletaj organizoj: la t. n. Unuiĝo Ĝenerala de Laboristoj *(Union general de trabajadores)*, gvidata de socialistoj, k la Nacia Konfederacio de Laboro = N. K. L. *(Confederacion Nacional del Trabajo). Malgraŭ* ke ambaŭ cititaj organizoj havas la saman fincelon, "la emancipon de l' laboristaro", tamen ili estas tre bonkonataj en la tuta lando pro siaj malsamaj agoj. La unua distingiĝas per sia reformema tendenco; la dua, kies revolucia historio estas brilega, mortis en la jaro 1923 pro la influoj de l' anarkistaj teorioj[1].

En 1923 k en antaŭaj jaroj la sindikatoj tre rapide multobliĝis, ke pro ekonomiaj postuloj ofte strikadis sukcese la N. K. L.-anoj. La tiama registaro, konsistanta el nekuraĝaj maljunuloj, tute ne kapablis solvi ian ajn problemon, k la tuta popolo, same la proletaro kiel la plej riĉaj kapitalistoj, malamis tiun netaŭgan ministraron.

[1] Mi ne detale traktos pri tio ĉi tie, ĉar K-do 15 043 jam faris tion en n-o 319 de "S-ulo".

La laboro de la faŝistoj

Oni diras, erare, ke la kapitalistoj nur deziras ĝui trankvilegon k bonkomfortan vivon k neniam zorgas pri io alia. La pasintaj okazintaĵoj en Hispanio tre klare pruvas, ke la kapitalistaro ĉiam pli atentas pri siaj aferoj ol la proleta klaso pri siaj propraj bezonoj.



1923–1930
La diktatoro: "La paco regas en Hispanio."

La malnova registaro nepre devis esti anstataŭita, sed dum la proletaro faris nenion, la faŝistoj laboregadis konigante la rezulton de sia laboro je 19-a de septembro 1923.

Tre serioza malhelpaĵo estis por la faŝistoj de l' jaro 1923 la tute revolucia N. K. L.-organizo. Sub la zorgo de l' faŝisto Martinez-Anido oni kolektis aron da pistol-pafistoj, kiuj estis tre bone pagataj, por ke ili sur la stratoj de Barcelono pafu sen timo. Tiel estis mortigataj la 30-an de novembro 1921 la du proletgvidantoj *J. Segi* k *F. Lagret* k kelkaj aliaj.

"En Barcelono regas la terorismo", kriis ĉiuhore la burĝaro, k tiel la faŝistoj kredigis tiutempe per gazetoj k ĵurnaloj, ke la anarkistoj estas krimuloj, kiuj nur celas mortigadi ĉiun paceman homon, kia ajn li estas. Tiel preparis la faŝistoj la vojon al la diktatoreco de 1923, kredigante al la popolo, ke nur ili solaj vere kapablas kuraci la malsanon anarkistan (= krimulegan). Alvenis al regado la diktatoro, k la popolo akceptis lin ĝoje. Ĉar ĉi tiu person(ar)o havis plenajn rajtojn k povon atenti pri ĉio k ĉiuj, likvidi la malsaton k la teroron.

La unuaj agoj de la diktatoreco en 1923

La diktatoro(j) agis laŭ siaj promesoj, k baldaŭ estis malleĝigataj la sindikatoj aligitaj al la N. K. L., same estis malleĝigata la komunista partio k enkarcerigataj ĝiaj anoj dum multaj monatoj. La revoluciaj eldonaĵoj, precipe la ĵurnaloj, estis konfiskataj k la revolucia proletaro estis subite senigita de ajna legaĵo.

Dume la socialistoj rajtis plue ekzisti; ili povis ĉu per ĵurnaloj, ĉu per paroladoj propagandi siajn ideojn k ne trovis kontraŭulojn, pro la malpermeso de l' revoluciaj organizoj. Ili predikadis pacemon al la laboristaro k rekomendis ne striki por transdaŭri vivante. Dum sep jaroj tiel ili influis per sia propagando la plimulton de la laboristaro. La komunistoj k anarkistsindikatistoj protestadis laŭpove, defendante siajn tendencojn, sed la diktatoro diris ofte: "La laboristaro nun vivas trankvile sub saĝa gvidado. Neniu havas pli da rajto gvidi la paceman laboristaron. Revoluciaj ideoj neniam estos permesataj."

Samtempe la diktatoro plinombrigis la sekretan policon, plibonigis la mort-

igeman armeon nomatan "civil-gvardianaro" k kreis novan armeon en urboj k vilaĝoj, nomatan "El Lomaten".

Nur viraj anoj de tiu faŝista institucio rajtis havi pafilojn k kapti aŭ enkarcerigi personojn el tiuj nomataj "danĝeraj". Do, ĉiuj bienuloj k mezklasanoj "Lomaten"-iĝis k por ĉiu loĝanto ne amiko de l' diktatoro, ekzistis en Hispanio certe kvar kaptistoj aŭ policistoj. Do la diktatoro pligrandigis ĉion, eĉ la malamon de la laboristaro, eĉ la malsaton. Tio, kion la diktatoro de 1923 ne pligrandigis, estis la salajroj k la libero de la proleta klaso. *(15 430)*

(Daŭrigota.)

PARLAMENTBALOTO EN "LIBERA URBO DANCIG"

16-a de novembro 1930. Ŝparemo laŭdire diktis la neceson pli frue elekti pli malgrandigitan parlamenton por Dancig. Monatoj, semajnoj, tagoj pasis, plenaj de preparlaboroj. Multnombre diskutis k disputis malsataj K-doj pasie pri neceso k vero de l' marksismo. Membroj de l' II-a k III-a Internacioj same fervore streĉis la fortojn kiel tiuj starantaj ekster la kadroj de tiuj ĉi grandaj organizoj por alporti eron al la venko de la marksisma proletaro. Tamen la faktoj seniluziigis multajn, k vundoj ricevitaj dum balota tempo tiom pli forte doloris.

Mandatojn

	havis en 1927	havas nun en 1930
Socialdemokratoj	42 (25)	19
German-naciistoj	25 (16)	12
Katolikoj	18 (11)	11
Komunistoj	8 (5)	7
Naci-socialistoj	1 (0,6)	12
Splitpartioj kune	23 (15,6)	10

Inter krampoj estas la nombro de mandatoj laŭ redukto de 120 al 72 delegatoj. — Nuntempe regas granda konfuzo, kiel starigi la parlamentan ekvilibron. Oni serĉas la rimedon por plej efike sufoki la marksismon. Burĝaj etuloj flatas la nunan giganton "naci-socialisto". Sed li mem estas surprizita k uzas fortajn infanajn vortojn por kaŝi sian nekapablon. Verŝajne li restos ekster la reganta koalicio, malgraŭ ke li antaŭe per ĉiuj rimedoj serĉis eblon ĝin eniri. Similaj vantaj vortoj, kiel "se ni estos 100%, ni transprenos la gvidon", deturnas la okulojn de lia besta malpovo. Tamen ĉiutage kakiĉemizuloj (faŝistoj) atakas aŭ komunistojn aŭ socialdemokratojn, eĉ katolikajn promenantojn per brutaj fortoj.

Ĉefan mokon nun eltenas la socialdemokrata partio, kiu ĝis nun plej forta frakcio en la reganta koalicio, konsekvence okupis plej respondajn fakojn en Danciga Senato, kiaj estas eksteraj aferoj, polico k laboro. La nomoj, kiujn la gazetoj represas kiel proponindajn, promesas la plej malbonon al ni laboristoj. Kaj la situacio plimalboniĝas de tago al tago. Solvo povus esti, se ni marksistaj fratoj trovus vojon komunan kontraŭ niaj malamikoj, eluzus ĉiun forton por ataki nur ilin k pleja minimumo inter ni estu malŝparata por interkomprenigaj diskutoj.

La nuna vintro estos la plej mizera, kiun ni travivis depost la inflacio.

Koko (2421).


Pri unu el la historie plej gravaj okazoj en la vivo de SAT informas aŭtentike la
Protokolaro de la X-a SAT-Kongreso
84 dense presitaj paĝoj. Escepta prezo (sen plia membro-rabato):
0,50 mk. g.
Administr. de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27, Sidejo de SAT, 23, rue Boyer, Paris XX.

SARDUJO (SAT-ano 15 973

(Daŭrigo. Vd. n-ojn 305, 306, 309, 314, 321)

La artefarita lago

Jam antaŭ la mondmilito potenca industria asocio projektis konstruadon de artefarita vastega lago en la centro de l' insulo. Sed tiu giganta projekto povis esti efektivigata nur post la milito. Granda rivero, nomata Tirso, kiu elfluas de la montara parto de la insulo, trafluas la centran k la sudan parton, tra valoj k krutaj intermontoj, akvoprovizas la lagon. En la plej konvena loko, t. e. tra la plej mallarĝa intermonto, oni konstruis fortikegan digon, kies bazo havas 60 metrojn da diko k la supro 30 metrojn, kun 80 metroj da alto. La lago havas sume 50 kvadrat-kilometrojn da surfaco. Tra la murego de l' digo estas lokitaj 16 turbinoj k interne vastegaj ĉambroj, en kiuj estas la necesa maŝinaro por krei k pligrandigi elektran forton. Tian elektroforton oni uzas nur por la lumigado de l' insulo, ĉar pro manko de industrioj en Sardujo, oni ne bezonas ĝin tiucele.

Se oni volus, per la lago oni povus plibonigi vastegan teritorion k igi ĝin tre fruktodona, precipe ĉar en Sardujo la pluvo malofte okazas ĝustatempe, t. e. tiam kiam la grenkreskaĵo bezonas ĝin. Do, se anstataŭ burĝa reĝimo regus en Sardujo komunismo, la lago povus esti por la loĝantaro fonto de netaksebla riĉaĵo.

Fakte, kiam oni projektis la konstruadon de la lago, por pli bone senigi la kamparanojn je iliaj terpecoj subakvigotaj, oni promesis, ke, konstruita, la lago devus utili al la kamparanoj, ĉar per artefaritaj riveretoj oni estus, en okazo de seko, subakviganta la kamparon k tiel la kamparanoj rikoltus pli abunde. Sed, male, la lago neniel utilas al la kamparanoj ĝis nun, k eble ĝi donos profiton al ili nur kiam per komuna forto ili renversos la kapitalistan sistemon k anstataŭos ĝin per laborista k kamparana respubliko.

Por pli bone kompreni, kiom utilus al la kamparanoj la lago, se per ĝi ili povus igi sian grundon pli fruktodona, necesas scii, ke en okazo de longdaŭra seko ili elprenas el preĝejo sanktaĵon k ĝin kondukas procesie tra la vilaĝo k ankaŭ tra la kamparo, por okazigi pluvon. La pastroj, ĉar ili estas pli ruzaj ol la loĝantoj, konsentas aranĝi tiajn procesiojn nur kiam ili antaŭvidas, ke baldaŭ pluvos. Tiel ili sukcesas stultigi pli k pli la malfeliĉajn kamparanojn, kredigante al ili, ke la tiom petegatan pluvon okazigis mirakle la sanktaĵo. Sed kredeble, se la lago kontentigus la bezonojn kamparanajn, ĉi lastaj ne plu sin turnus, nek al sanktaĵo, nek al pastro por elpeti pluvon.

Kuriozaj antikvaĵoj

Precipe tra la montara parto de la insulo oni povas vidi, ĉe rokaj krutaĵoj, geometriajn artefaritajn kavernojn, kies enirejo estas apenaŭ sufiĉe granda por ke homo klinita povu trapasi. Dialekte oni nomas ĝin "Domo de Jana". Jana, laŭ la legendo, estas nomo de l' homgento, kiu ĝin konstruis k enloĝis en praepoko. Tiaj pratempaj estuloj laŭŝajne estis multe malpli grandaj ol la nuntempa homo, ĉar la malalto de iliaj loĝejoj ja atestas pri tio. Sed ili ŝajne estis tre inteligentaj. Ja tio estas pruvita per la kav-skulpta, tre miriga laboro.

Kiel ni jam diris, la enirejo estas tre malalta, sed ĝi estas geometrie kvadrata. Interne estas pluraj etaj, mezaj k grandaj ĉambroj arte, skulpte kavigitaj, apenaŭ sufiĉe altaj por stari surgenue. La ĉambroj interne estas interligitaj per malgrandaj enirtruoj similaj al tiu, kiu komunikas kun ekstero. Ofte en unu sola rokaĵo estas dekoj da tiaj artefaritaj truoj, alkomunikitaj interne al centoj da subteraj ĉambretoj, kiuj, precipe la plej malproksimaj, ne estas esploreblaj pro manko de spirebla aero. Ĉe ŝtonegoj defalintaj k kredeble detranĉitaj de l' rokaro per fulmoj, oni povas ekkoni duonĉambrojn, kies konforman respondan parton oni trovas ankoraŭ en la rokoj. Tio pruvas klare, ke tiaj kavernoj ne nur estas pratempaj, sed eĉ antaŭdiluviaj. Bedaŭrinde ni ne povas kontentige priskribi ĝin, pro tio ke en Sardujo ĝis nun la scienco ne okupis sin pri tiaj esploroj.

Alia miriga vidindaĵo estas la restaĵoj, de loko al loko, de grandegaj turoj rondformaj. Ĝenerale ĉi tiuj turoj estas disfalintaj en ruinojn pro sia aĝo, sed oni povas ankaŭ trovi kelkajn preskaŭ sendifektajn. Ili estas konstruitaj el simplaj egaj ŝtonmasoj tiom grandaj k multepezaj, ke 50 homoj ne povus ilin eĉ ekmovi. Tio estas vere miriga, se oni pensas, ke en pratempo, kiam ili estis konstruataj, tute forestis la modernaj scienc-teknikaj rimedoj por suprenlevi tiajn grandajn pezegajn ŝtonegojn. Kvankam ili estas konstruitaj sen kalko nek ia ajn kunliga materialo, ili spitobstinis al la uraganoj tra jarcentoj. Ni ne povas konjekti la daton de ilia konstruado, sed certe ili datiĝas de tre malproksimaj praepokoj, eble ili estas same prahistoriaj kiel la "Domoj de Jana". Tiujn ĉi turegojn oni nomas sarde "nurakoj". Laŭŝajne la "nurakoj" estis militaj fortikaĵoj k samtempe restadejo de la regiona reganto. Ni vidas, ke la milita rabado havas siajn radikojn profunde en tre malproksimaj epokoj. (Finota.)

LA KLASBATALO TRA LA MONDO

Filmcenzuro k naciismo en Germanio

Volonte cedis la reakcia Supera Filmcenzurejo en Berlino al la protestmanifestacioj de l' faŝistoj k naciistoj kontraŭ la pacisma militfilmo usona "En Okcidento nenio Nova" (laŭ la fama romano de Remark). Ĝi malpermesis tiun ĉi filmon por la tuta regno sub la preteksto, ke en ĝi estas malhonorata la malnova imperia armeo k ĝi "malutilas al la germana prestiĝo en eksterlando". Aliflanke la polico zorgis tre atenteme, ke ne okazu ĝenado de l' prezentado de ŝovinista monarkiema filmo pri Frederiko la II, gloranta la Sepjaran militon k la militon ĝenerale. Kiuj interrompis la prezenton per krioj protestaj, tiuj estis arestataj. Oni eĉ liberigis de impostoj tiun ĉi filmon kiel filmon de "publika edukado". Tiu signifoplena fakto montras, kiu hodiaŭ regas k diktas sian volon en la germana respubliko.

Kun la celo, *per esperanto* liveri materialon al la soc. gazetaro k utili nian aferon, K-do *Wendt*-Leipzig dissendis al SAT-anoj demandilon por enketi pri la efiko de l' Remarkfilmo en aliaj landoj k tiel helpi senmaskigi la reakciajn fiagojn, kiuj kondukis al la malpermeso de l' filmo en Germanio.

Metalistaj salajroj en Germanio

La salajroj en la metalindustrio de Bremeno malaltiĝis je 6% por la laboristoj; 5% por la metilernantoj; 4% por la laboristinoj. Salajrmalaltigoj de 4—7% same okazis en Bilefeld, Turingio, k la metalindustrio de l' Vupervalo. Manifestacioj de senlaboruloj en diversaj urboj daŭras. La policprefektoj malpermesis ĉiujn politikajn manifestaciojn okaze de l' Kristnaskaj festoj. H.

Labortempo de l'maristoj en Hispanio

En Hispanio validiĝis je 2. oktobro 1930 nova regularo pri la labortempo sur ŝipoj, kiu difinas 8-horan labortagon k 48-horan laborsemajnon. La ministro de l' ŝiparo ricevis instrukcion fari la necesajn paŝojn por apliko de la regularo, en kiu tasko certe tamen eblas fari malpli favorajn interpretojn. Estas ero da ironio en la fakto, ke dekiam la Internacia Transportlab. Federacio entreprenis sian agitadon por internaciigo de l' 48-hora surŝipa semajno, la unua tiudirekta paŝo estas farita ĝuste de la diktaturlando Hispanio k ne de landoj, kiuj ankoraŭ havas demokratan reĝimon.

Laŭ I. T. F.-Bulteno, dec.

Produktlimigo k senlaboreco en karbindustrio (Japanio)

Stoko de karbo atingis jam duoblan kvanton kompare kun lasta jaro k la industriistoj decidas produktlimigon altgradan. En Kiuŝiu, centro de karbekspluatado, oni decidis malpli-produktadon 30%-an. Tio tuj sekvigis senlaboriĝon ĉe la ministaro. Fine de septembro 1930 nur en tiu loko pli ol 3 mil laboristoj estis maldungitaj.

Kamparaj konfliktoj en Japanio

En Akita-gubernio kelkaj konfliktoj okazas. Rimarkinda estas tiu en Hira-gun, kie bienulo Masuda, parlamentano, malpermesis al terkulturistoj rikolti la rizon kulturitan de ili; 200 terkulturistoj kontraŭstaris la bienulon k policon manifestaciante kun ruĝaj standardoj. En Gunĉiku (Kumamoto=gubernio) 260 terkulturistoj batalis kuraĝe kontraŭ bienula unuiĝo k defendas riskante la vivon siajn kampojn kontraŭ rikolt-malpermeso. *Laŭ "Scienco Proleta", n-o 12, Tokio.*

Vojaĝimpresoj de K-do Perer[1]

(3. daŭrigo. Vd. n-ojn 324, 325, 326)

Polaj regionoj, kiujn mi vizitis, prezentas la samajn trajtojn kiel la supre citita en Ĉeĥoslovakio. Diferenco ĉi tie estas, ke ĉia laborista movado estas tute malpermesita. La popolo okulvideble vivas jam pli malbone ol en Germanio. Laboristaj aŭ esperantaj organizoj estas ĉiel bojkotataj. Tamen ordo ekzistas tiurilate, ke dimanĉe ĉio estas fermita. Sur ĉiuj publikaj lokoj staras soldatoj aŭ policistoj kun armiloj. Kolektiĝo sur strato estas malpermesata.

Multon oni skribas, pensas, eraras, mensogas pri Sovetio. Fakte ĉi tie okazas unu el la plej mirindaj metamorfozoj, kiu iam ajn okazis sendube sur nia planedo. La rusa revolucio, kiu naskiĝis el teruregoj de l' homaj frenezoj, kies kaŭzoj estas esence enradikigitaj en la fiagoj de l' kapitalist-imperiista reĝimo, la rusa revolucio, mi diras, daŭras ĉiutage. La malfaciloj renkontataj de tiuj popoloj, kiuj sin liberigas, estas nemezureblaj; ili estas politikaj, moralaj, fizikaj. Post venko de l' ruĝarmeo super civilmilito la lando sin trovis ĉirkaŭita de malamikaro, kiu ĝin nepenetreble blokis. Krediton oni rifuzis, malamon oni disvastigis kontraŭ la novan respublikon. Minacon militan k ekonomian oni starigis konstante, plifortigitan de kalumnioj k mensogoj. Interne la revolucio renkontis du ĉefajn barojn: Malklero de l' amaso, fiagoj de kontraŭularo.

Fizike la lando prezentas gigantan teran blokegon. Al fremdulo okcidenta ĝi prezentiĝas kiel giganta duonsovaĝejo. Vojoj, ŝoseoj forestis. Industrio estis nula. Metiismon, manfabrikadon balais la revolucio; restojn da ĝi oni renkontas ankoraŭ ĉie. La naturaj riĉoj estas nemezureblaj. Civiliza grado en la kamparo, pro malklero de l' amaso unuflanke, pro izolo due, estis ĝis nun primitiva.

Rusaj kamparanoj (eĉ ankoraŭ unuopaj) ne havis liton por si. Spite teruraj klimataj rigoroj kontinentaj (— 50° ĝis + 50°) oni ne konstruis loĝejon por labora k mastruma brutaro. La kamparano, pro malklero, plugis ankoraŭ per ligna plugilo . . .

Tian situacion trovis la juna revolucio. — *Kion mi nun vidis, aŭdis, sentis?* 15 monatojn mi traveturis tiun ĉi vastegan landon, k nur ĉu bicikle, ĉu piede. En la kamparo: En ĉiuj gravaj centraj ĉefpunktoj oni komencis maŝinkonstrui ŝoseojn, uzante usondevenan traktoron. Nemezureblajn ebenaĵojn oni nun pli k pli maŝine prilaboras, per plej modernaj iloj, kiujn movas benzin-traktoroj. Por raciigo de l' grund-ekspluatado oni organizas kolektiv-mastrumojn, ĉu ŝtatajn (sovĥozoj), ĉu kooperajn (kolĥozoj). La unua tipo estas simpla ŝtata kreskaĵ-fabriko kun samaj leĝoj k reguloj kiel en industriaj fabrikoj. Kolĥozo estas kooperigita mastrumo de unuopaj kamparaj familioj. Ekzistas du nuancoj: kolĥozoj k komunoj. Unuaokaze la anoj unuigis sian materialon, brutaron, maŝinaron, sed

[1] France: Peraire.

PRI KLERIGO EN UZBEKIO

La nuligita de l' rusa revolucio malbenita cara registaro regadis Turkestanon kiel kolonian bazon, liveranta krudaĵojn por kotonaj fabrikoj de la centro. Pro tio estis malpermesita konstruado de teksfabrikoj tie, kie kotono kreskas.

En fako de popolklerigo la caraj jugantoj agadis plej fie: la registaro malfermadis tielnomatajn "rus-indiĝenajn" lernejojn, kie la radika loĝantaro estis edukata de rusaj oficistoj-instruistoj laŭ interesoj de la rusaj kapitalistoj k feŭda registaro k bezonis tradukistojn. En indiĝenaj "malnov-metodaj" lernejoj la pastraro instruadis tre malgrandan kvanton da infanoj pri araba legoscio, akirebla por malgranda malplimulto el la riĉa loĝantaro. Kiel okazis la klerigo en tiuj lernejoj, montras jena fakto: en ia oceano estas insulo; sur ĝi kreskas arbaro, kies fruktoj estas homoj k animaloj. En lernolibroj estis presitaj taŭgaj desegnoj: arboj kun sur la branĉoj pendantaj infanoj, fiŝoj ktp. —Rezulte, en Turkestano estis 1—2% da legosciaj homoj.

La soveta registaro donis plenan memregadon al popoloj liberigitaj de cara k kapitalista jugo. Ĉiu ŝtato, kiu eniris la Union, nome: Uzbekio, Taĝikio, Turkmenio, havas proprajn popolkomisariojn en kleriga fako, ne dependajn de Moskvo. Tamen ili uzas gvidadon k materian subvencion de la centro, stariginte antaŭ si la celon pleje disvolvi la klerigon en ĉiuj partoj el la 7 sovetiaj respublikoj.

Dank' al tiu politiko en Uzbekio estis malfermata granda kvanto da malsuperaj, mezaj k superaj lernejoj, havantaj la celon doni konformajn kadrojn de teknikistoj en ĉiuj regionoj de la tre rapide disvolviĝanta mastrumo. En lernejojn (kompreneble senpagaj) varbiĝas la infanaro el la plej malriĉaj tavoloj. Por ili oni aranĝas komunloĝejojn, donas ĉiumonatajn monhelpojn. En lernejoj kune lernas knaboj k knabinoj.

Krome oni aranĝas kursojn por maturaĝaj laboristoj k kamparanoj, por prepari ilin al superaj k mezaj teknikaj lernejoj. En tiuj multnombraj kursoj okazas seninterrompa vigla laboro. La kursanoj liberiĝas de la laboro je 2 horoj pli frue ol iliaj kamaradoj en la fabrikoj. Ili havas 6- horan labortagon. Por nuligi analfabetecon de l' loĝantaro estis aranĝita t. n. "kultura kampanio", alloganta ĉiujn legosciajn anojn de sindikatoj por instrui analfabetojn.

La lernejoj faras grandan kulturlaboron inter la loĝantoj, organizante kontraŭreligian laboron. Tiucele ili propagandas natursciencon k aranĝas vesperojn kun muziko k taŭgaj spektakloj. Somere la lernantoj estas sendataj en kamparon por instrui vilaĝajn maturaĝulojn. Tiu ĉi laboro devas doni grandajn rezultojn, k ne daŭros longe, ĝis la estintaj caraj kolonioj fariĝos kulture k ekonomie plenvaloraj landoj.

N. Domenik, Kokand, Meza Azio.

---

vivas dise; nur la laboro estas komunigita. La "komuno" estas unuiĝo el la plej malriĉa tavolo de kamparanoj. Ĉar ili nenion aŭ preskaŭ nenion havis, la ŝtato zorgis pri komunloĝejo, maŝinaro, brutaro, litoj, lernejo ktp. En ĉiuj vilaĝoj oni povas vidi: vendkooperativon, klubon aŭ legodomon, oftege (en grandaj vilaĝoj) kuracejon, vilaĝdomon, preĝejon, banejon (krom la du lastaj ĉio estas sovetakiroj).

En urboj: Kiel la aliaj landpartoj, urboj estis nur duone zorgitaj. Nenie en Sovetio oni trovos en urboj urinejojn. Krom la ĉefa, preskaŭ ĉiuj stratoj ne estas pavimitaj. Akva kanaligo forestis, ofte ankaŭ elektro, tramoj ktp., same kompreneble ankaŭ bonaj laboristaj loĝejoj. La revolucio ĉion ŝanĝis. Ĉie oni nun konstruas; konstruas febre, rapide, entuziasme. Per propraj okuloj mi vidis: gigantan biciklo-fabrikon en Odeso, elektrostaciegon en Novorosisk, fabrikegon kun tute nova laborist-urbo en Stalingrad (traktorfabriko). (Daŭrigota.)

KIEL MI EKIĜIS DUBEMA

Miaj gepatroj estis kredemaj katolikoj. De ili k ankaŭ en lernejo k preĝejo mi kun fiero eksciis, ke nia katolika eklezio estas la sola sanktiga eklezio. En mia infana aĝo mi jam spertis mizeron. Tiom pli ĝoje mi aŭdis k ankaŭ firme kredis pri eterna feliĉostato en ĉielo post nia suferplena vivado. Ke la aliaj, la protestantoj k judoj, venos post la vivo en la inferon, estis por mi memkomprenebla fakto, ĉar la kara dio kreis inferon, — do li laŭ sia neesplorebla plano certe zorgos pri sufiĉe granda nombro da pekuloj, kiuj estos tie rostataj. Kun tiu naiva kredo mi — kiel 20-jara vilaĝano — fariĝis soldato. Ĝis tiam mi kredis, kiel instruis la religio, ke la superuloj ricevis sian oficon rekte de la kara dio. La unuaj semajnoj de mia soldata vivo tre plaĉis al mi, ĉar antaŭe mi penege devis labori en karbminejo. Iun dimanĉon, ni katolikaj soldatoj revenis el nia preĝejo en la kazernan korton. Tie staris la protestantaj soldatoj de nia taĉmento, pretaj por iri al sia preĝejo. Oni kondukis nin en vico kontraŭ ili. La ĉefsuboficiro venis. Rapide li konstatis, ke mankis kvar soldatoj en la vico de la protestantoj. Li turnis sin al nia vico k ordonis: "La kvar lastaj de la katolikoj en la vicon de la protestantoj!" Ege konsternite mi aŭdis tiun ordonon, ĉar mi estis la tria lasta, — do ankaŭ mi. La tri aliaj tuj iris al la alia flanko; nur mi restis senmova. Mi fakte ne povas kompreni tion, — mi — katoliko — en protestantan preĝejon!?

Jam la superulo kun severa mieno alproksimiĝis. Kvazaŭ por senkulpigi min, mi diris: "Sinjoro ĉef-suboficiro, mi estas katoliko k jam estis en la preĝejo." Kolere la superulo alkrias min: "Ĉu vi ne scias, kiam la germana soldato rajtas paroli?" Mi respondis: "Nur kiam superulo demandis lin." La alia alvokis la deĵorantan suboficiron dirante: "Notu tiun rekrutaĉon, — li parolis nedemandite. Dum tri tagoj oni ekzercu lin krome!" Poste li denove ordonis al mi iri en la vicon de la protestantoj. Mi obeis kapskuante pri tia kontraŭdia postulo. Rimarkante tion la superulo postkrias min: "Dum tuta semajno vi estos ekzercata krome."

Feliĉe por mi en tiu momento alvenis la deĵoranta oficiro, k ni tuj ekmarŝis. Survoje mi pripensis, kion fari? Forkuri? Neeble! Baldaŭ mi puŝite de la aliaj sidis en la protestanta preĝejo. La diservo komenciĝis. Komence mi ne volis aŭskulti la por mi herezajn parolojn de la pastro. Mi tute proksime sidis antaŭ li. Post kelka tempo mi devis konstati, ke inter katolika k protestanta pastroj la sola diferenco estas la vestaĵo, la paroloj estas la samaj.

Post duona horo mi estis la plej atenta aŭskultanto. Antaŭ mi kelkaj soldatoj dormis. Eĉ la pastro rimarkis tion k plilaŭtigis sian voĉon. Sed kiam la ronkado antaŭ mi ĉiam plilaŭtiĝis, subite la pastro en granda kolero ĵetis libron en la vicojn de la dormantoj. Tuj la oficiroj alkuris. Post la diservo ili notis la nomojn de tiuj, kiuj sidis en mia benko, — ankaŭ min — pro dormado en la "domo de dio". Dum tuta monato post la ĝenerala deĵoro oni ekzercadis nin — la krimulojn — speciale. En tiuj teruraj horoj penetris en mian cerbon la unuaj duboj pri tio, ĉu en nia mondo estas tia bela ordo, kiel kredigas al ni dikventruloj. Tie mi komencis dubi k malami la militismon.

J. Burger (601).

Pro abundo da materialo ricevita k nuna limigita amplekso de "S-ulo" ni estas bedaŭrinde devigitaj prokrasti la enpreson de multaj manuskriptoj, kiujn volonte ni aperigus. La K-doj verkintoj bonvolu kompreneme rilati al la malfaciloj, en kiuj ni baraktas.

Red.

SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 20. – REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT. – Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstr. 22
Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12

El "Misteroj de l' kristana antikveco" de G. Fr. Daumer

Fondiĝ- k inaŭgur-oferoj

Unu el la plej strangaj tradicioj, en sfero de l' germana fabelaro, estas jena: Al la kavaliro de Uĥtenhagen, kies kastelo estis lokita sur kastelmonto apud Frajenvalde, promesis la al li dankŝulda princo-elektisto tiom da tero, kiom la kavaliro povus ĉirkaŭrajdi de sunleviĝo ĝis sunsubiro. La kavaliro ekrajdis, renkontis en Nojenhagen paŝtiston, senkapigis lin k starigis foston apud la kadavro; la foston oni ankoraŭ konservas en la komunumoficejo de Nojenhagen. Tiel oni limigis per fostoj, ekfondis bienojn; oni senkapigis iun simplan viron, kiun oni hazarde renkontis k tiel oferis por dio. — Kiam oni konstruis digojn, kastelojn, pontojn, urbojn ktp., — laŭ antikva moloĥisma superstiĉo, la konstruo ne estis fortika, eĉ ne povis esti finita, sen enfoso aŭ enmasono de homoj, nome infanoj k virinoj; se oni ne jam de komenco faris tiajn kruelaĵojn k montriĝis malfaciloj por la konstrulaboro, tiam ankaŭ poste, oni donis fondiĝ-oferojn al dio.

Laŭ dana fabelo oni volis konstrui digon en Kopenhago; kiomfoje oni ekkonstruis, tiomfoje ĝi disfalis. Nun oni prenis senkulpan knabineton, sur la diga fundamento sidigis ŝin ĉe tablo, donis al ŝi manĝojn k ludilojn. Dum la knabineto manĝis k ludis, 12 majstroj konstruis volbon super ŝi k nun surkonstruis — dum muzikado, digegon, kiu ĝis nun fortikege staras.

En Aria 1000 viroj ekmasonis ponton; kion ili dumtage ekkonstruis, tio dumnokte disfalis. Nun eksonis el la ĉielo anĝela voĉo, ordonanta, ke oni enfosu homon, nome la edzinon de l' konstruestro. Kiam nun la edzino venis al la konstruestro, ĉi tiu pretekstis, ke lia ringo falis en dig-fundon; la edzino sin proponis alporti ĝin. Dum ŝi plenumis tion, oni rapide enmasonis ŝin.

En la antikva kastelo Heneberg oni vidas en muro niĉon; pri tiu rakontas maljunuloj jenon: Ĉe la ekkonstruo de tiu kastelo iu masonisto vendis sian fileton por vive enmasoni lin en tiu ĉi niĉo, por ke la kastelo estu nevenkebla. La infano estis de la kruela patro mem enmasonata; ĝi manĝis bulkon k plore ekkriis dum la masonado de la lasta ŝtono: "Ho, patro, patro, kiel mallumiĝas!" Ĉi tio kortuŝegis la viron, li falis de ŝtupetaro k rompis sian kolon.

Ke la patro mem enmasonis sian infanon, tio ne estas individua kruelo, ĉar li mem pro ĉagrenego pereis. Ĝi okazis ja pro postulo, pro kondiĉo, por ke la efiko estu tiom pli forta; la pleja kruelaĵo estas laŭ moloĥismaj principoj la pleja piaĵo, pleja sanktaĵo k plej dia volo.

En la antikva kastelo Libenŝtajn, estas enmasonita infano, vendita de sia patrino. La popolo ankoraŭ rakontas, kiel la infano ploregis, baraktegis, sed neniom helpis. La popolo ankoraŭ kredas aŭdi dumnokte la ploradon de l' infano k asertas, ke la masonistoj, kiuj enmasonis ĝin, fariĝis strigoj, ĉirkaŭflugantaj ankoraŭ nun la kastelruinon.

Se tiuj kredoj k moroj vere estis tiel ĝeneralaj, tiam en mezepoko, ĉe la grandnombro da kasteloj k ties malkonstruado k rekonstruado oni bezonis multegon da homoferoj, kies enmasonon oni konsideris utila k necesa.

Ankoraŭ fabelo tia, kiu cetere jam montras ioman mildon k eblon de forlaso de tiu kruelo — okazinta en Magdeburg. Tie estas malnova muro apud la Kreten-pordego, kie oni enmasonis infanon dum la ekkonstruado de l' urbo. En la muro oni konstruis niĉon, en ĝin starigis tableton kun oro k pano; la civitanoj devis loti. Kiun trafis la loto, tiu devis doni sian infanon. Oni sidigis ĝin ĉe la tablo. Nun dependis de tio, kion ĝi prenis de la tablo: se ĝi prenis la oron, tiam ĝi estis perdita, ĉar la oro signifis morton. Ĝi prenis la oron, k dum ĝi ludadis, oni senkompate enmasonis ĝin.

La fabeloj sufiĉe gravas por ne lasi dubon pri la iama kutimo de l' kristana kruelo; oni nur pensu pri la, de ĉielo postulema anĝelvoĉo. Cetere ĉi tiuj estas konfirmitaj per konformaj trovaĵoj.

Ekz. en la kastelo Pleŝe ĉe Getingen, en ties pordega muro oni trovis infanĉerketon enhavanta neputrintajn ostojn (Gotŝalk). Same en murego de iama kastelo Krajnberg, proksime de l' urboj Baĥ k Salcungen, oni trovis infanskeleton (Gotŝalk III). Je tio Gotŝalk notas: "Ĉi tio treege memorigas al la kruela kredo, ke ĉe ekkonstruo de kasteloj, por gardi ilin kontraŭ akcidentoj, oni rabis aŭ aĉetis infanojn de malriĉaj gepatroj por vive enmasoni ilin. Ŝajnas, ke ĉi tiu kutimo regadis, ĉar la mortintoj el la kastelposedanta familio ĉiam estis entombigataj en kastelpreĝejo, kasteltombejo aŭ en proksima vilaĝtombejo, sed ne estas konata, ke tia kadavro estas enmasonita en kastelmuroj."

La afero estas tiom pli certa, ĉar tiu kredo ankoraŭ dum la pasinta jarcento vivis inter la popolo. Verema k fidinda inspektoro de porakvo-konstruado rakontas jenon.

Dum la jaro *1813* sur la rivero Elbe rompiĝis digo, kies rekonstruo kaŭzis malfacilan laboron. Venis maljunulo k diris al li: "Vi ne povos rekonstruigi tiun ĉi digon, se vi ne enfosos senkulpan infanon." Pli novan ekzemplon notas J. Grim, laŭ kiu dum 1843 ĉe pontkonstruado en Hale la popolo opiniis, ke oni devus enmasoni infanon en fundo (Grim, Mitoj).

Ĝis nun nur estis menciite pri la neekleziaj fondiĝoj k konstruoj, sed simile ankaŭ estas ĉe la ekleziaj konstruoj ktp. Ĉe la fondiĝo de katedralo en Strasburgo estis laŭ plej signifa tradicio, enfosataj du fratoj, ĉar aliel la konstruo ne fortike starus (Aĥim de Arnim, Berlin 1840). Plue ni aŭdas, ke iam sub la altaro oni enfosis ŝafidon por certigi la ekziston k prosperon de l' preĝejo. La enfosita ŝafido estas konsiderita kiel fantomo k tio antaŭsignifas la rilaton al infankadavro. Se dum la tempo, en kiu ne estas diservo, oni iras en la preĝejon, tiam oni vidas ŝafidon kuranta k malaperanta. Ĝi estas la ŝafido preĝeja. Se la lasta montriĝas sur la tombejo al la tombisto, tiam ĝi avizas la morton de infaneto, kiu baldaŭ estos entombigita (Afcelius III). Tiu ĉi ŝafido signifas la morton de infano: "Kia frapanta, perfida interrilato!" Certe iam oni enfosis aŭ enmasonis infanojn k nur pli poste ŝafidojn, kiam ĉesis la homoferado. Pliaj tradicioj estas; oni enfosas porkojn k kokojn sub domoj, same vivan, blindan hundon ktp. sub stalpordo aŭ staltrogo. En Grekio estas la opinio, ke la unua preterpasanto je fundamenta ŝtono ĉe novkonstruota domo, mortos dum la sama jaro; por malebligi ĉi tiun malfeliĉon, la masonistoj mortigas kokon sur la ŝtono, aŭ ŝafidon. Laŭ fabeloj oni pelis kokon trans novkonstruitan ponton en Frankfurt. Laŭdire la unua viva estaĵo, kiu transiris ponton novan, apartenas laŭ kontrakto al la diablo (Grim, Fabeloj I). La tombejon oni inaŭguris per ofero de vive enfosita ĉevalo, antaŭ ol oni entombigis homkadavron. Ankaŭ la ĉevalon oni konsideris kiel fantomon, kiu avizas feliĉajn k malfeliĉajn okazaĵojn. En Ŝonen sur iu tombejo, kiu eĉ nomiĝas laŭ tio, montris sin blanka ĉevalo (Grim k Afcelius). Ankaŭ, anstataŭ la lastnomita besto, iam estis oferata viva homo.

Elgermanigis 1180.

TRA ESPERANTIO

LA IDEA RIFUĜEJO DE DEMIDJUK

Kiu konas iom detale la postkulisajn aferojn, kiuj okazis en nia movado, jam dekjaraĝa, tiu pli facile komprenas ĝian nunan staton. Almenaŭ ne trompas min la ŝajnigita indigno de Demidjuk pro tio, ke mi donis al la batalo personecan karakteron anstataŭ idean. Ne necesas esti tre profundpensa psikologo por tuj ekvidi, ke tiu sinteno ĉe nia K-do montras ĝuste tion, kion li deziras kaŝi. Same kiel li akuzis min pri "reviziismo" por kaŝi sian propran k realan reviziismon, same li rifuĝas sur idean kampon por maski la fakte personecan bazon de opoziciaj atakoj.

En antaŭa artikolo mi klarigis, kial la dekomencaj subfosantoj al SAT ne sukcesis ĝin detrui per ia idea preteksto. Mi sekve ne bezonas tion klarigi hodiaŭ. Sed estas interese scii, ke en leteroj de K-doj Demidjuk k Nekrasov, nun tre obeemaj anoj en CK de SEU, oni povas trovi sufiĉe multajn atestojn pri tio, ke "certa", plej influpova persono en Moskvo, ĉiam konsideris nian organizon kiel "provizoran restadejon", al kiu certe venos la tago, kiam li "donos al ĝi sur ĉapon[1]". Estas tiu sama persono, kiu "kompreni ne povas, ke kultura organizo ne estas komparinda kun policadministrejo". Jes, ja mi havas la konvinkon, bazitan sur multaj pruvoj, ke ĉe la origino de l' skismo troviĝas persona motivo de "K.B.D."[2]-ulo. Se mi eraras, kulpas miaj informintoj, inter kiuj estas K-do Demidjuk mem...

Sed, ĉar li tiom deziras porti la batalon sur la idean kampon, mi kontentigu lin iomete. Onidire mi faris grandegan pekon, verkante: "La Laborista Esperantismo". Tiu verketo estas neallasebla[3], "kontraŭproleta", kiel diris iu juna K-do ĉe la Londona Kongreso. En la V-a ĉapitro estas ja parolite pri "tendenco, kiu kelkrilate ne akordiĝas kun la nuntempa programo de l' laboristaj partioj". Nu, ĉu do konstati fakton, ekzistantan en nia movado ekde ĝia stariĝo, tio estas herezaĵo nepre kondamninda? Ne povas esti. Aliel mi troviĝus en simila situacio kiel tiu de Galileo antaŭ la inkvizicio. Li devis surgenue k publike malkonfesi sian "herezon", nome, ke sin movas la tero ĉirkaŭ la suno. Sed post sia malkonfeso li tamen daŭre diris pense: *Eppur si muove.*

Se pro timo esti konsiderata kiel herezulo, mi malkonfesus la ekziston en SAT de sennaciisma tendenco, tio ne forigus la fakton, ke ĝi ekzistas, ke relative multaj SAT-anoj prave aŭ malprave, absolute ne volas pro ia ajn motivo libere partopreni batalon por naciliberiĝo; K-doj, kiuj firme k senkompromise agnoskas nur la *klasbatalon.* Se mi neus aŭ forsilentus tiun fakton, tio estus peko kontraŭ la veron. Tiu tendenco ja ekzistas pli malpli konscie ekde la fondiĝo de nia Asocio. Sed en la sama "hereza" verketo estas klarigite, ke: "Oficiale, statute SAT konfesas sennaciecon en sia organizformo, sed ne sennaciismon kiel socipolitikan teorion."

Ke la sennaciismo, kiel ĝi devas esti komprenata, ne akordiĝas kun la internaciismo de Marks, Lenin, Luksemburg, Kaŭcki, Stalin, Baŭer aŭ Trocki, nu, konsentite! Tion neniam asertis konsciaj sennaciistoj. Ili havas respekton por la menciitaj aŭtoritataj gvidantoj k ne volas perforti k sofistigi ilian instruon. La sennaciistoj scias, ke tiuj homoj estis aŭ estas sufiĉe kleraj por koni la ekziston de la vorto *kosmopolitismo*, kiu ekzistas en ĉiuj kulturlingvoj. Kaj ĝuste la fakto, ke ili ne uzis tiun vorton por difini sian politikon, plej trafe montras, ke ĝi estas internaciisma, ne sennaciisma. Kaj tio estas tute logika k konsekvenca ĉe homoj, kiuj malatentas la lingvan demandon, kiuj ignoras esperanton. Ĉu ili povus prezenti al si la problemojn kiel mondlingvanoj, kiel esperantistoj? Neeble! Sed mi havas la konvinkon, ke se la gvidantoj de l' laborista movado scipovus esperanton k aplikus ĝin kiel faras aktivaj SAT-anoj, ili havus alian perspektivon pri la ebla evoluado de l' homaj socioj. Kiam, hazarde, Stalin aŭ iu alia parolas pri "kunfandiĝo de l' nacioj"[4] k pri iu komuna lingvo, li tute ne klarigas, kiel tio povos okazi; li nur eldiras nebulan frazon, kiu ne antaŭenigas la demandon je unu paŝo. Paroli pri estonta komuna lingvo, kiu rezultus el la kunfandiĝo de alte evoluintaj lingvoj kiel la angla, la germana, la franca, la rusa aŭ aliaj lingvoj, estas absoluta sensencaĵo je lingvistika vidpunkto[5].

Ekzistas nur du vojoj por la solvo de l' problemo: unu, la imperiisma, kiu trudus nacian lingvon al la tuta mondo; dua, la racia, kiu rezultus el la alpreno de artefarita lingvo, de esperanto. Estus ne pli malfacile esperantistigi la tutan Sovetion ol ĝin industriigi. Sed tion ne entreprenas la gvidantoj de Sovetio, tial ke ili ne kredas, ke esperanto povas esti konsiderata kiel vivanta lingvo, kiel valora kulturilo k unuecigilo.

Kaj, kompreneble, gvidantoj de SEU, kies ĉefa zorgo estas ĉiam aspekti kiel ortodoksuloj antaŭ la okuloj de partigvidantoj, ne kuraĝas kontraŭdiri al la vidpunkto de Lenin aŭ Stalin. Ili preferas vadi en marĉo de kontraŭdiroj, provante klarigi la signifon de esperanto per tute filistraj

---

La plej favora tempo

por varbado estas komenciĝo de jaro.

Memoru ĉiam, ke "S-ulo" pro la nuna maleblo ricevi abonmonon el Sovetio, devas kompensi tiun perdon en la ceteraj mondpartoj...

Antaŭen por la 12-paĝa "S-ulo", atingota per sistema, aktiva varbado de novaj abonantoj!

---

1 Ruslingva esprimo, kiu signifas: *forpuŝi ĝin.*

2 Esperante: *Kien ventas.*

3 Tuj ĉe la apero SEU decidis, ke ĝi estas "nedisvastigebla en Sovetio".

4 En la literaturo de plej diversaj epokoj oni povas trovi similajn dirojn de homoj, kiuj eĉ ne estis revoluciuloj. Mi citis plurajn en la n-o 233 de "S-ulo".

5 Ĉi-okaze mi citu mian rimarkigon al la fama programprojekto, kiu troviĝas en la Protokolaro de la VIII-a Kongreso en Göteborg: "...se estas fakto, ke multaj vortoj, precipe teknikaj k sciencaj, eniras en ĉiuj modernaj lingvoj, oni tamen ne rajtas konkludi el tio, ke la diversaj malsamspiritaj lingvoj, tendencas al kristaliĝo en unu solan lingvon. Pri tio mi citu la opinion de *A. Meje* (Meillet) el lia verko: *La Lingvoj en la Nova Eŭropo:* 'La ŝanĝoj en la vortaro estas sendependaj de tiuj en la elparolo k gramatiko; ili devenas de malsamaj agoj, k oni ne rajtas konkludi de unu al la aliaj' (pĝ. 124). Sur alia pĝ. la eminenta lingvisto pliprecizigas sian penson: 'Ekzistas en Eŭropo pli ol 25 Hindo-eŭropaj lingvoj, kiuj ludas aŭ al kiuj oni volas ludigi rolon de civilizigaj lingvoj... Ĉiuj tiuj lingvoj estas, en nuntempa stato, *neintermikseblaj*... (substreko nia). Lingvo fiksiĝinta en propran formon kontraŭstaras al ĉiuj aliaj; en ĝi daŭre fiksiĝas propra tradicio' (pĝ. 104/105).

"...Esp-o ne naskiĝis per natura procedo, sed per la genia elpensemo de homo. Zamenhof arte faris sian lingvon k la nuna stadio de l' civilizo, rezulto de multaj artefaritaĵoj, ebligas, ke ĝi vivu k disvastiĝu tra la tuta mondo.

"Mi citis la opinion de scienculo, sed la simpla saĝo, la observado montras al ni, ke lingvoj *alte evoluintaj* (pri tiuj lingvoj nur valoras nia rimarko) ne tendencas al kunfandiĝo." ...Ni do ne parolu pri "natura procedo", sed kun plej aŭtoritata lingvisto ni diru: *"Lingvo estas socia institucio tradicia, kiu rezultas el la homa volo."* (A. Meje, pĝ. 104/105) en *La Lingvoj en la Nova Eŭropo.*

konsideroj. Ili aliĝas al la fronto de l' neŭtraluloj, de l' konservativuloj, kiuj ĉiam akcentas, ke esperanto tute ne celas forpuŝi la naciajn lingvojn, ke ĝi volas esti nur helpa lingvo k neniel ĝeni aŭ difekti la naciajn kulturojn. La vidpunkto de la CK de SEU estas sekve duoble ortodoksa: ĝi ne kontraŭdiras la politikon de Stalin k akordiĝas kun la pozicio de Kar (Cart), la prezidanto de la Esperanta Akademio!...

Sed tia temo postulas longan pritraktadon, k K-do Demidjuk bonvolu kredi, ke ne manko de argumentoj devigas min lasi ĉi tie provizore la skribilon.

E. L.

LAVANGO DA MENSOGOJ

Multaj K-doj el diversaj landoj ricevis lastatempe la n-on 10/11 de "Bulteno de CK de SEU". Ili povis konstati, ke ĝi estas tute plenigita je plej krudaj mensogoj. Tuta n-o de "S-ulo" ne sufiĉus por rebati ilin ĉiujn. Ne utilas cetere. Ni volas nur respondi ĉi tie al punktoj, kiuj rilatas nian *Vortaron*. Ne ĉiuj legantoj de nia gazeto posedas tiun libron k ili povas esti erarigataj de la fiaj asertoj en la menciita Bulteno. En ĝi estas asertite:

1. Ke la Direkcio "rezignis la proponon de kelkaj kapablaj vortaristoj-SAT-membroj prepari la Vortaron"; 2. ke pastro Rambu, eldonanto de "Espero Katolika", k la "renegato" Revo fariĝis kunaŭtoroj de la vortaro.

3. ke mankas la vortoj *marksismo, radiostacio, brodkasti, radio.*

Tri asertoj, tri mensogoj aŭ malveraĵoj:

a) Neniam ni ricevis proponon de "kapablaj vortaristoj" preni sur sin la verkadon de vortaro; ni ricevis nur diversan materialon, kiun ni transdonis al la aŭtoroj, k kiun ili utiligis aŭ ne laŭ sia bontrovo.

b) Pastro Rambu sendis liston da difinoj pri teologiaj terminoj, kiun same ni transdonis al la aŭtoroj. S-ro Grenkamp submetis al K-do Lora (Revo) la difinojn pri ekonomiaj terminoj, tial ke lia kompetento en tiu fako estas bone konata. Li ja instruis en Moskvo mem dum 3 jaroj la ekonomian sciencon k sekve la CK de SEU pli bone ol iu ajn estas informita pri tio.

c) Troviĝas en la vortaro (pĝ. 304) difino pri *historia materialismo*, k en Sovetio oni certe scias, ke tiu ismo estas samsignifa kiel marksismo; la vorto *Radio* fakte ankaŭ troviĝas sur la pĝ. 401 k eĉ havas 30-linian difinon; same la vorto Stacio kuŝas supre sur la pĝ. 445 kun 11-linia difino.

Sed estas vere, ke mankas la vorto "brodkasti", kiu ne estas necesa, tial ke esp-o esprimas la ideon per la vorto *disaŭdigi.*

Do, la tri asertoj el la "Bulteno" estas plene mensogaj.

Tamen estas ja vere, ke mankas en nia Vortaro necesaj vortoj kiel *soveto* k. a., sed tio estas nur forgesa manko, kiu estos forigata en la 2-a eldono.

La legantoj povos prijuĝi la honeston de la anonima aŭtoro de la artikolo en "Bulteno de SEU", kiam ili ekscios, ke pastro Rambu mem en novembra n-o de "Espero Katolika" dediĉas pli ol du paĝojn por mallaŭde kritiki la difinojn pri teologiaj terminoj k eĉ avertas la katolikojn, ke tiu vortaro ne estas metinda en iajn ajn manojn...

Ankaŭ recenzistoj de neŭtralaj gazetoj riproĉas, ke: "Ne-SAT-anojn ŝokas kelkaj ekonomiaj, politikaj k religiaj difinoj iom tendencaj."

Ni ne kredas, cetere, ke tiu lasta riproĉo estas ĝusta. Aliel en venonta eldono oni devus *sentendencigi* la esprimojn. Niakomprene, vortaro estas scienca verko k ne devas enteni agitpolitikan materialon. Laŭ nia plano, teologiajn terminojn devas verki aŭ kontroli teologo; ekonomiajn, ekonomiisto ktp. Kiam ateisto volas rebati trafe deismon, li devas bone koni la signifon de la vortoj, kiujn deistoj uzas. Kaj pri ĉio same.

Sed ni ne volas misuzi pli da loko por refuti facile refuteblan, sed vere ne refutindan skribaĉon. Al la lavango da mensogoj, per kiu la CK de SEU provas nin entombigi, ni kontraŭmetos digon el plena indiferento. Ne decas al la CK de SEU riproĉi pro tio, ke ni komisiis al la Direktoro de la Sekcio pri komuna vortaro en la Esperanta Akademio k al tri a. L. K.-anoj la taskon verki vortaron. Ĉiu ja devas scii, ke 5 anoj el tiu sama CK apartenas la neŭtralan Lingvan Komitaton!!

Koniginda ankaŭ estas la fakto, ke la ĝenerala sekretario de la CK de SEU, s-ro E. Drezen, estas eĉ membro de la *Academia pro Interlingua*, kiun iniciatis la itala profesoro Peano antaŭ pluraj jaroj. Kaj estas bone konate, ke tiu institucio kun pompa titolo ne havas kiel celon propagandi esperanton. Tute male!... La entrepreno cetere neniel estas serioza, ĉar sufiĉas pagi kotizon por esti ano de tia "akademio".

Eble iun tagon ni ankaŭ raportos pri la tre suspektinda sinteno de la sama s-ro antaŭ la idista movado. Dume la legantoj juĝu mem pri la sincero de la Moskvaj neŭtraluloj.

Nova SAT-libro!

Ĵus aperis kiel volumo 12/13 de "Biblioteko de Sennaciulo"

Kristanismo kaj Patriotismo

de **L. N. Tolstoj.**

Traduko de I. Maĉernis.
Kun bildo de l' aŭtoro.
112 paĝoj. Form. 11×14 cm.

Prezo: 1.20 mk. g.

Mendu tuj ĉe Sidejo, 23 rue Boyer, Paris XX, aŭ Administrejo de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

KIE ESTAS LA "LANDO" AMERIKO?

Nenie. Lando kun nomo: Ameriko ne ekzistas en la esperanta lingvo. Ameriko ne estas lando, sed unu el la 5 terpartoj (kontinentoj). Ĝi enhavas multe da landoj, inter ili ankaŭ Usonon, kiun oni nomas en naciaj lingvoj plej ofte Ameriko anstataŭ la tre longa k malracia nomo oficiala: "Unuigitaj Ŝtatoj de Nord-Ameriko". La naciaj lingvoj ne havas unu solan radikvorton por nomi Usonon. Sekve ne estas mirinde, se nacilingve oni nomas ĝin plej ofte Ameriko. Sed kial en esperanto oni identigas Amerikon kun Usono. Ameriko k Usono tiel diferencas, kiel ekz. tuta Eŭropo k Germanio. Usono estas nur *parto* de Ameriko, sekve pri-amerikaj paroloj k skriboj povas rilati ankaŭ la eksterusonan parton de Ameriko. Amerika imperialismo, amerika kapitalismo, Amerika Federacio de Laboristaro, amerika dolaro, amerika onklo, amerika milionulo estas malkorektaj esprimoj, kiam ni volas paroli pri usona imperialismo, usona kapitalismo, Federacio de Usona Laboristaro, usona dolaro, usona onklo, usona milionulo. Esperanto estas sufiĉe riĉa por havi radikvortan nomon por tiu lando, k ni devas uzi nur ĝin.

SAT-ano 29, Novjorko.

Ni ricevis leteron de K-do M. Oholiav (12 824), per kiu li protestas kontraŭ la enhavo de la letero de K-do Ker, aperinta en la n-o 319 de "S-ulo". Intertempe ni estis informataj, ke stariĝis en Novjorko komisiono el K-doj Bonesper (29), Odinov (13 268), K-dino Feingold (14 652), por esplori tiun aferon. Ni sekve atendas la rezulton de tiu esploro k en oportuna tempo publikigos ĝian konkludon.

Korektoj. — Pro bedaŭrinda malatento en la kompostejo oni legas en pĝ. 99 de n-o 325 la titolon "Por ni mem", kiu (laŭ la manuskripto) devas esti: "*Pri* ni mem". Bv. korekti! Same tiel sur pĝ. 103 (sama n-o) aperis anonco pri *Plena Vortaro*, anstataŭ, kiel de ni indikite, pri la *Protokolaro de l' 10-a Kongreso*, al kiu lasta broŝuro fakte rilatas la 2 novkompostitaj linioj "Tre taŭga informilo dokumentoriĉa..." (por "Plena Vortaro" ili ne havas sencon)!

TRA LA MOVADO

KRONIKO

FRANCIO. Kolmar. Esp. Sekcio estas fondita ĉe la "Naturamikoj" (kun kurso). — *Nancy.* La grupo eldonas hektografitan monatan bultenon. Ĝi konkur-invitis la K-dojn el Saarbrücken por varbi dum la vintro 50 novajn lernantojn, 30 novajn membrojn al FEO, 10 al SAT k 10 novajn abonojn por "S-ulo". Imitinda ekzemplo! Krome la grupo aktive preparas la 11-an Kongreson de FEO (paskon 1931). Tiun Kongreson partoprenos ĉ. 200 germanlingvaj K-doj el Saarlando, Elzaso k Germanio (pro proksimo de la landlimo), k tiel la kongreso donos okazon por trafa propagando. — *Orléans.* La grupo malfermis vintrokurson k varbas speciale inter la multnombraj fremdaj laboristoj — *Parizo.* En la urbo mem (sen ĉirkaŭurbo) funkcias 4 kursoj kun sume 90 lernantoj. — *GERMANIO. Leipzig.* Ĉi tie fondiĝis loka grupo de Socialista Esp. Asocio (SEA) je 15. 10. 30 el iamaj LEA-membroj, kiu havas nun 49 membrojn. Grupkunvenoj okazas 1-an k 3-an merkredon dum ĉiu monato. Nur SAT-anoj gvidas la grupon (37).

VEGETARA SEKCIO EL SAT-ANOJ

Provizore K-do Klaps (*Dancig,* Karpfenseigen 12) transprenis la gvidon de l' Sekcio ĝis la venonta SAT-kongreso. Ĉion rilatan al la Sekcio oni sendu al lia adreso. Ni atentigas laboristajn vivreformulojn, ke interlige kun la Olimpiado okazonta dum julio en Vieno, fondiĝis soc. frakcio de vivreformuloj, kun celo detiri lab. elementojn el burĝaj organizoj aŭ socialistigi la lastajn. Ĉi tiu grupo zorgos pri alvenontaj sportuloj-vegetaranoj faciligante al ili vivadon en Vieno. Oni konigu tion en la lab. gazetaro nacilingva k informu pri tio al la Sekcigvidanto (vd. supre).

Pri Stalingrada laborpropono

(vd. n-on 318, pĝ. 48) ni ricevis plendon de K-do Burbey (8048) el Leeds, ĉar K-do Sajapin ne respondis al lia skribaĵo, per kiu li petis detalojn pri la afero (post averto de la kompartia ĵurnalo "Daily Worker", ke nuntempe la sov. registaro ne povas permesi amasan enmigradon de ĉiaj laboristoj pro loĝeja manko k aliaj malfaciloj). Aliflanke K-do Sajapin sciigis nin per PK de 18. 11. 1930, ke dum du tagoj li ricevis de 16 germanaj diversurbaj K-doj leterojn, ilin transdonis al la fabrik-administracio k respondis al ili poŝtkarte, kun espero atingi ilian transloĝiĝon.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Pinokjo, de *C. Collodi,* trad. *Mirza Marchesi.* Eldonis: The Esperanto Publishing Co. Ltd., B. E. A., 142 High Holborn, London, W. C. 1. 150 pĝ. Prezo: broŝ. 3 ŝ. 6 p., bind. 5 ŝ., afranko 4 p.

Libro por infanoj. Malfeliĉaj infanoj! Tiu verko, kiu pretendas amuzi ilin, nur predikaĉas (sub dialogaj formoj, kiuj malofte sukcesas esti komikaj, kiuj eble itallingve estas iom pentrindaj, dialektecaj), obeon al gepatroj, al ĝendarmoj. Ĝi prezentadas studadon kiel *enuon,* dum nur la maniero instrui povas esti enuiga. Ĉiu estaĵo, eĉ hundo, ŝafo, estas scivola, avidas lerni. Infanoj tiom pli. Do, infanoj ne timas la studadon; ili nur timas la malbonajn instruantojn. Ĉiu fantaziero, en tiu libro, negracie imitas iun konatan gracian fabelon. Mi fidas al infanoj: ili enue forlasos la libron k reprenos la malnovajn fabelojn laŭ bonaj aŭtoroj, laŭ Grim *(Grimm),* Peroŭ *(Perrault)* k. a. Ili prenos la librojn de Herminja cur Milen *(H. Zur Mühlen),* en kiuj la fantazio ne falsas realan vivon, sed male koloras realon, fabeligas veron ne malverigante ĝin. Ili legos "Diablidoj"n de N. Bartelmes[1], kiun redonis al mi dudekjara laboristo dirante: "Tiajn librojn devus legi la infanoj . . ."

Oni bone komprenu: mi ne kondamnas *neverŝajnon,* brilanta ilo por fantazio k humoro, sed kondamnas nur *stultan* neverŝajnon. Mi ĵus legis fabelojn, kiujn verkis infanoj mem por infanoj, eldonitaj de "La Gerbe" (La Garbo) ĉe K-do C. Frene *(Freinet).* Tre gracie, en tiuj imagaĵoj, infanoj atingas fantaziegan neverŝajnon. Sed en tiu neverŝajno mem kato montras katan karakteron, kapro fariĝas mirinda kapro, sed kapro, ĉevalo fariĝas ĉevalo heroa. — En "Pinokjo", ekzemple, iu granda hundo ne scipovas naĝi! Malbonega kvalito de fantazio.

Tiu "Pinokjo" daŭrigas la "savarmean literaturon", specialan malsanon de burĝesp-istaj eldonejoj. Ju pli senvalora estas la libro, des pli laŭda la antaŭparolo: ". . . ora libro . . . juvelo, verko homareca . . . en la plej nobla senco de la vorto."

Dua antaŭparolo: ". . . ora k fama verko." Oro. Oro. Burĝoj!

Mi nomas tiun libron "ankoraŭ iu persekuto de gepatraĉoj kontraŭ infanaro". *Jief.*

Emil Isac, Sonorilo k Kanono. Poemaro en prozo. Traduko el rumana lingvo de *Tiberio Morariu.* Eld. Heroldo de Esperanto, Köln. 60 pĝ. Form. 13×20. Prezo: 1,20 mk. g.

"Sonorilo k kanono" — simboloj pri paco k milito. La prozformaj poemoj aŭ poeziaj prozaĵoj en tiu ĉi volumeto estas belaj laŭ formo k enhavo, atestas pri riĉa fantazio k granda esprimtalento de l' aŭtoro, kiu cetere staras en publika vivo. Plejparte ili estas penetritaj de pacisma ideologio; estas la preferata temo de Isac. La traduko estas senriproĉa, la lingvo korekta.

N. B.

[1] Mi bedaŭras, ke K-do Jief citas ĉi-loke miajn "Diablidoj"n, tute alispeca legaĵo, realisma, nefantazia, simpla aventur-rakonto. Mi antaŭvidas, ke iun tagon iu vivanta knabo, renkontante K-don Jief, pruvos al li, ke la fantaziprodukto "Pinokjo", la ligna hometo, estas lia (de la knabo) dua memo k ke sekve la rakontaĵo havas tute alian efikon sur lin ol enuigan . . . Kaj tiu knabo estas tute ne escepto. — N. B.

Esp-istoj en grava lab. centro koresp. kĉl. Gelaboristoj sendu L. Ĉiu L, precipe kolektiva, tre helpos nian laboron. IRH sendu L. al ĉi tiea ĉelo (MOPR), kiu kontaktas kun nia komitato esperantista. Adreso: *urbo Ŝaĥti* (Nordkaŭkazo), ul. III. Internacionala, 120. Al L. Levenzon (Sovetio).

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

A Batalha, Lisboa, 29. 11., Sklavoj en antikveco (309), sen mencio de l' fonto!!; *The Leeds Citizen,* 19. 12., Tolaĵo por novenask. (323).

Represis el "LNE"

Le Populaire, Paris, 24. 12., Amassporto k lab. kulturo (apr. 1930).

Priesper. artik. enhavis:

Signalen, Stokh., 11. 12., 25. 12. (Jul-n-o); *Arbetaren,* Stokh., 12. 11. (rubr.); *Enköpings Nyheter,* 18. 11. (kurso); *ITF-Bulteno,* A'dam, dec. (rubr.); *Arbeiterpolitik,* Leipzig, 25. 11.; *L'Action Laïque,* St. Etienne, dec.; *Régénération,* Paris, dec.

Pri SAT-Kongreso raportis:

Juna Bolŝeviko, Kiev, 7. 9., 21. 9.; *Marten,* Kiev, 27. 7. 30.

NIA POŜTO

13 132. — Via artikolo aperos.

KORESPONDADO

ĈEĤOSLOVAKIO

Filatelistoj! — Kiu sendos al mi 100—300 aŭ pli da PM, eble div., el sia lando, tiu ricevos la saman kvanton el Ĉeĥoslov. Adr.: K-do J. Kopeckij Ŝturan 4, *Preŝov.*

DANIO

— Mi dez. koresp. kun ĵurnalisto aŭ kun s-ro aŭ fraŭlino, kiu interesiĝas pri vojaĝoj. Adr.: Jens A. B. Jacobsen, Balslev Prastegaard pr. Eiby St. Fyn., *Odense.*

FRANCIO

K-do Roland Pruvot, *Blerancourt* (Aisne), k liaj geamikoj koresp. kun Gek-doj el Britio, Estonio, Latvio, Litovio.

GERMANIO

— Kursgvidanto dez. koresp. kĉl. Skribu al: K-do H. Haase, *Hettstedt,* Südharz.

K-do Heinrich Ridder, Kampstr. 5, *Bielefeld,* kĉl, L, PI, PK.

K-do Linus Uhlig, *Borstendorf/Erzgebirge Nr. 59,* kĉl, PM, PI. Resp. garantiata.

K-do Karl Kohlhauer, Dr.-Fritz-Opel-Platz Nr. 10, *Rüsselsheim/M.,* kĉl, interŝ. amatorfotojn.

NEDERLANDO

K-do G. A. v. Groningen (ĉarpentisto en lignofabriko), Nylstr. 8, *Haarlem,* kun sammetiistoj, precipe el Sovetio, pri ĉ. temoj, kĉl.

NEKROLOGO

Nesanigebla proleta malsano prenis el niaj vicoj nian karan paĉjon k SAT-K-don 877

GUSTAV LEBETSAMER

Per li ni perdas nian plej bonan, plej maljunan k favoran kunhelpanton. — Honoron al lia memoro!

SAT-Rondo, Nürnberg.

ENHAVO

	paĝo
Hispanio — Ĝia evoluo de 1923 ĝis hodiaŭ	**113—114**
Parlamentbaloto en "Libera Urbo Dancig"	**114**
Sardujo	**114—115**
La klasbatalo tra la mondo	**115**
Vojaĝimpresoj de K-do Perer	**115—116**
Pri klerigo en Uzbekio	**116**
Kiel mi ekiĝis dubema	**116**
Sennaciula Liberpensula Paĝo	**117**
Tra Esperantio	**118—120**

Presejo: Neudrag, Leipzig (Germanio)